RADIO HABANA CUBA
Artículo Editado por Maritza Gutierres González
28/11/2016 15:52:57

La kubanoj omaĝas sian gvidanton tra la tuta lando.



Havano, 28 nov (RHK) La kubanoj ekalvenis tre frue en la mateno ĝis la Memorialo José Martí ĉe la Placo de la Revolucio kie longe vicas por doni lastan omaĝon al Fidel Castro.

La loĝantaro respekteme donas sian lastan adiaŭon al la historia gvidanto de la kuba Revolucio, samkiel eksterlandaj gastoj kiuj venis por plenumi tiun ĉi lastan tributon.

Same okazas en la orienta provinco Santiago de Cuba ĉe la Placo Antonio Maceo kaj tutlande, ĉar estis preparitaj 1060 lokoj tra la tuta insularo por ke la kubanoj havu la eblecon subskribi la omaĝlibron kie estas skribita la koncepto de Fidel pri Revolucio, kio konsistigas ankaŭ kompromison esti fidelaj al tiu koncepto, esprimita de Fidel la 1-an de majo 2002, vaste konata de la tuta popolo.

Je la sepa vespere de la 29-a de novembro, okazos amasa renkontiĝo en la Placo de la Revolucio José Martí, kaj sekvatage ekos la karavano kiu portos la cindrojn de Fidel Castro laŭ la itinero inversa kiu memorigas La Karavanon de la Libereco farita en januaro de 1959.

La entombiga ceremonio okazos je la 7-a matene de la 4-a de decembro en la tombejo de Santa Ifigenia, en Santiago de Cuba, lulilo de la kuba Revolucio.